Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**26-a de julio 2020, numero 4**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Aperis la programo de la Virtuala Kongreso



La Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) atingis la markon de preskaŭ 1800 aliĝintoj el 93 landoj en la 26-a de julio, la Tago de Esperanto. Individuaj membroj de UEA (kaj TEJO) rajtis aliĝi senpage ĝis tiu tago (efektive ĝis la 27-a de julio 12:00 UTC, noktomezo de la 26-a de julio ĉe Alasko). La riĉegan programon* anoncas al la komunumo ekskluzive la Reta Revuo:
https://revuoesperanto.org/programo_vk

Plu eblas aliĝi per https://vk.mondafest.net kontraŭ simbola kotizo, kiu varias de 5 EUR ĝis 20 EUR laŭ landoj. Landoj de kategorioj 1 kaj 2 laŭ la kotiztabelo de UEA plu rajtos aliĝi senpage. La informoj pri kiel aliri la ekskluzivan sistemon de la Virtuala Kongreso atingos kongresanojn ĝis la 31-a de julio, retpoŝte.

**Organizantoj rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn en la programo.*

## Kadre de la Jaro Hodler




Por la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) kaj kadre de la Jaro Hodler (aprilo, 2020-aprilo, 2021) la brazila artistino Anna Lobo faris la artan animacion "Hector Hodler" donace al Universala Esperanto-Asocio. UEA deklaris la periodon aprilo, 2020 – aprilo, 2021 kiel la Jaron Hodler, memore al la centjariĝo de la morto de Hector Hodler, la 31-an de marto 1920. La Jaro malfermiĝis per la numero 4/2020 de la revuo *Esperanto*, dediĉita al Hodler, libere elŝutebla ĉe la retejo de UEA – https://uea.org/revuoj/esperanto/2020 – kaj kun voĉlegado en *UEAviva*: https://youtu.be/T4Q-rK_8Iz4 kaj aliaj.

Anna Lobo afable akceptis la inviton de UEA marki la Jaron per sia arto. Ŝi specialistiĝas per cifereca arto. Por konatiĝi kun aliaj laboraĵoj ŝiaj, vizitu la paĝon kaj trovu la ligilojn:
https://revuoesperanto.org/anna_lobo

UEA kore dankas al Anna Lobo!

Subtenu la laboron de UEA per membriĝo:
https://uea.org/alighoj/alighilo

**Ĉirkaŭ 1800 personoj el 93 landoj jam aliĝis al la Virtuala Kongreso de Esperanto 2020. Aliĝu ankaŭ vi!**



# Klerige: Fremdaj kaj geniaj objektoj el nia mondo



Fremdaj kaj geniaj objektoj el nia mondo – kun Sylvain Lelarge! Aliĝu ĝis la 1-a de aŭgusto (21:50 UTC) por interaga prezento kun Sylvain Lelarge kadre de la kleriga programo de MondaFest' 2020!

Ni vivas inter miloj da objektoj. Niaj domoj ofte tro plenas je aĵoj, kies plimulton ni eĉ ne tuŝas dum jaroj. Ni kolektis ilin laŭ la vojo de nia vivo kaj ili akompanas nin plu. Inter ili kelkaj tamen meritas specialan atenton. Estas tiuj ĉiutagaj objektoj, kies uzo ne tute evidentas. Ofte geniaj, fojfoje frenezaj, ili iam respondis al bezono, nun estas forgesata, kaj rakontas al ni pri aliaj kulturoj, ĉu de aliaj landoj, ĉu de aliaj tempoj, aŭ proponas solvon de problemo, kiun ni mem eble ankoraŭ ne perceptis. Ili ĉiam donas okazon miri kaj rideti pri kaj pro la homa kreemo.

Sylvain Lelarge, kiu 20 jaroj gvidas paroligajn kursojn de Edukado.net dum la Universalaj Kongresoj, jam tre longe kolektas tiajn nekutimajn objektojn. Ĉi-foje li invitas 25 scivolemulojn partopreni lian interagan ZOOM-prezenton. Interaga, ĉar ankaŭ la partoprenantoj havos la okazon prezenti sian objekton, kiu validos kiel enirbileto!

Interesitoj povas registriĝi per sendado de retmesaĝo al sylvainlelarge@gmail.com.

Ĉiuj povos sekvi la filmon de la sesio pere de la jutuba kanalo de UEA: http://youtube.com/ueaviva. Pliaj informoj: https://eventaservo.org/e/klerige-sylvain

# Kanada Virtuala Kinejo: jam 18 filmoj kaj du intervjuoj por la Esperanto-komunumo

Oni povas diri, ke la filmarto "estas la kanada nacia arto", diras Ĵenja Amis, la sekretario de la montreala LKK (105-a kaj 107-a UK-oj). Montrealo planis por la Esperanto-komunumo riĉan filman programon, kiu devus okazi en la 105-a UK en 2020, nuligita pro la pandemio. Tio tamen ne malhelpis la brilon de la kanada arto por Esperantujo, kaj kun plezuro la montreala LKK ofertis la Monda Festivalo de Esperanto la Kanadan Virtualan Kinejon (KVK)! Temas pri aro da mallongaj filmoj (multaj el ili animaciaj) de la Nacia Filmoficejo de Kanado (NFO), reprezentantaj diversajn aspektojn de la kanada kulturo. La traktataj temoj inkluzivas pacon, indiĝenajn popolojn kaj animaciajn teknikojn. "Per la Kanada Virtuala Kinejo ni volis aldoni plian aspekton – la artan aspekton – en la traktado de la kongresa temo de 2020: "Dialogo kaj Interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo", kiu faris la temo de MondaFest' 2020.

La KVK ja pioniris en la Festivalo. La 19-an de junio, eĉ antaŭ la Somera Inaŭguro de MondaFest' la 20-an de junio, okazis la antaŭfestivala malfermo de la virtuala kinejo per aperigo de la la filmo "Nigra Animo", de Martine Chartrand, omaĝe al la Junideka Festo. Kaj post la Somera Inaŭguro la kinejo plu estis la protagonisto de la unuaj tagoj de la Festivalo, kun proponoj pri filmoj por la 21-a de junio (Kanada Tago de Indiĝenaj Popoloj), la 24-a de junio (Kebekia Nacia Tago) kaj la 1-a de julio (Tago de Kanado). Tion raportis la reta *Revuo Esperanto* (Reta Revuo): https://revuoesperanto.org/kinejo. Nun en la KVK jam troviĝas 18 filmoj kaj 2 historiaj intervjuoj kun kanadaj filmartistoj.



*«La sabla kastelo», Oskar-premiita filmo de Co Hoedeman.*

# Somera Esperanto-Studado

La 26-an de julio sukcese finiĝis la unua virtuala Somera Esperanto-Studado (SES). Se vi ne partoprenis, kelkajn prelegojn eblas gustumi en ĝia Facebook-paĝo – https://www.facebook.com/SomeraEsperantoStudado/ Sekvu la Retan Revuon kaj la revuon *Esperanto* – tie aperos la raportoj pri SES.

# Kelkaj programeroj de la estonta Virtuala Kongreso

Sekvu novajn numerojn de la *Festivla Kuriero*, kie ni daŭrigos publikigi la anoncojn.




Esprimi sin estas maniero rezisti. En tiu prelego pri indiĝena aktivismo kadre de la Scienca Kafejo, Manuela Burghelea rakontos al ni pri interesaj aspektoj de la nuntempa indiĝena (inter)komunikado.




La Tago de Lernado (kompilita de ILEI) dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK) proponos ankaŭ prelegon de Ilona Koutny pri la eduka valoro de Esperanto-instruado!




Penny Vos prelegos kadre de la Tago de Lernado (kompilita de ILEI) dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK) strategia valoro de lernejoj por Esperanto.




La Internacia Kongresa Universitato okazos dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK). Unu el la sep prelegoj de IKU estas «La ora nombro» de François Lo Jacomo, kiu ankaŭ traktos la temon dum la studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj.

## IJK 2020 en ciferoj

En la reta IJK, kiu okazis inter la 10-a kaj 18-a julio 2020, partoprenis 316 homoj el 52 landoj. La nombro de aliĝintoj estis 367.

Aperis oficiala statistiko pri IJK en la retejo TEJO! Tio povas esti utile, se vi volas verki artikolon pri la kongreso ekzemple por landa revuo aŭ blogo, aŭ amuze, se vi vi simple scivolas. https://ijk2020.tejo.org/statistiko/



# Tra la Jaroj

Orlando E Raola




En la jaro 2002 mi partoprenis mian duan Universalan Kongreson en la urbo Fortaleza, norda Brazilo. Tiam, mi ankoraŭ ne havis porteblan personan komputilon, do mi notis plurajn aferojn en kajereto. Pro tio, ke dum tiu ĉi feria somero mi (kaj eble ni ĉiuj) devis resti hejme, unu el la "someraj projektoj" estas purigi iom miajn paperŝrankojn (mia edzino diras, ke mi faras tion por havi lokon por pli da paperaĵoj), kaj dum tiu purigado mi retrovis la kajereton, kiun mi kunportis al Fortaleza. Mi iom nostalgie legis la notojn pri la Komitata Kunsido, pri la Oratora Konkurso, ..., rememoris mian renkontiĝon kun Claude Piron en la flughaveno de Sao Paŭlo, survoje al la kongreso... kaj poste mi alvenis al noto, kiun mi volas diskonigi, ĉar ĝi havas rektan rilaton al la baldaŭ okazonta Virtuala Kongreso:

Ĵaŭde, la 8-an je la 16:00 okazis kunsido de uzantoj de retaj babilejoj. Partoprenis 10 gekongresanoj el 4 landoj. Ni konstatis la utilon kaj gravecon de tiuj ĉi novaj komunikiloj kaj interkonsentis labori cele al ilia kreskado kiel efektivaj kunligiloj de E-istoj loĝantaj dise tra la mondo.

> Estiĝis la propono kunordigi la retan elsendadon en "reala tempo" de la kongreseroj de la 88-a Universala Kongreso en Göteborg. Tio ebligos la partoprenon de la uzantoj de tiuj servoj en la unua "Virtuala Universala Kongreso".
>
> Kunordigos la laboron O. Raola KN 1154, kiu jam trovis apogon por tiu agado ĉe estraranoj Corsetti kaj Tonkin kaj ĉe s-ro Lindblom nome de la organizantoj de la kongreso.

Nu, ni devis atendi dek ok jarojn por havi vere virtualan kongreson, sed mi scivolas, ĉu tiu kunsido estis la unua, kie ĝuste tiu nomo estis uzita.

# Esperantaj memorlokoj, ricevu diplomon pri ZEO-hu!

Szilvási László,
Lingvo-Studio, Hungario

Ĉu en via lando ekzistas sur la mapo oficiala Esperanto-monto, aŭ Esperanto-fontoj, ĉu ekzistas Esperanto-arboj, -pontoj, -memorŝtonoj, -skulptaĵoj? En Hungario jes, ekzistas plurdekoj de ili!

Okaze de la nuna **naskiĝtago de Esperanto**, mi lanĉas novan projekton pri Esperantaj memorlokoj, kun akireblo de speciala diplomo pro ilia vizitado!

En aparta retpaĝo mi kolektis la ĉefajn Esperantajn memorlokojn en Hungario kun iliaj fotoj kaj mallongaj klarigoj. Nun ili estas 21 memor-objektoj en 17 urboj. Se iu vizitas difinitan kvanton de ili kaj pruvas tion per *selfio*, li povas pretendi **specialan atestilon, numerigitan diplomon** pri tio!

**Vidu:** http://www.eszperanto.hu/zeo-hu/ **(du-lingva)**

Iu ajn povas partopreni la projekton, ne estas bezonata alta lingvoscio. Oni povas ekskursi kun amiko kaj amikino, eĉ kun la krokodila edzo aŭ edzino... :-))). Dum la vizitado tamen oni ne nur agrable ekskursas, sed iom konatiĝas kun la Esperanta historio kaj kulturo!




***Esperantaj memorlokoj, ZEO-j en Hungario***

Aliaj avantaĝoj estas, ke tiuj memorlokoj ligas eĉ la eksajn kursanojn, Duolingvo-ulojn kaj Lernu-ulojn al la Esperanta komunumo, kaj kompreneble oni povas tre efike uzi la projekton ankaŭ por ekstera informado, reklamado de Esperanto!!

La retejo legeblas ankaŭ Esperante, **serĉu la verdan flagon**, do la diplomo atingeblas por ĉiuj esperantistoj, ankaŭ eksterlandaj... :-)

La nuna tasko estas konigi la projekton dise en la movado, aparte en Hungario, kaj peti la helpon de instruistoj, kursgvidantoj por instigi siajn studentojn akiri la diplomon!

